

LA ĜOJO DE LA PEKULO LA MURMURADO DE LA JUSTULOJ

Komentario al evangelio de la XXXI dimanĉo de la ordinara tempo (Lk. 9, 1-10)

Zakĥeo, la ĉefrolanto en tiu ĉi epizodo, estas prezentata al la legantoj tra du malsamaj vidpunktoj, unuflanke tiu de la rakontinto, kiu lin priskribas detale, preskaŭ pere de lantigilo (*rememorante lian nomon, lian profesion, lian rangon, lian statuson, la korpan aspekton, liajn agojn kaj reagojn*) aliaflanke tiu de la ĉeestantoj kiuj lin difinas per ununura vorto: “pekulo”. Du vidpunktoj pri la homa realo sin alfrontas, el ili evidentiĝas kaj la respektoplena atento al aliulo, kaj la malestimo al li. Kaj ne temas pri du arbitraj manieroj konsideri la proksimulon, sed unu estas tiu kiu devenas de la fido je la plano de Dio por la homaro, la alia estas tiu fiksita de la religio per sia observemo.

La judismo en la epoko de Jesuo vidadis en la bildo de la impostisto la impostokolektiston, la tipan ekzemplon de la pekulo, ĉar li estis taksata kiel profesia ŝtelisto kaj renegato je la servo de la fremda reganto. Sankta Luko ludas kunmetante serion da elementoj kiuj rilatas la rolulon kaj igas lin aparte malamata: li estas la ĉefimpostisto kaj riĉulo, sed antaŭe la evangeliisto enkondukas ĉion per ironia afero, fakte en la hebrea lingvo Zakĥeo signifas “la pura”, la “senkulpulo”, kaj tri fojojn tiu ĉi nomo estos memorigata, kvazaŭ Sankta Luko volus substreki la veran identecon al kiu la ĉefimpostisto estas vokata.

Ĉar temas pri konkreta persono, sur kiu koncentriĝis la malŝato de la popolamaso, kiu vidis en la riĉeco de Zakĥeo la rezulton de mistifiko kaj de misuzo de la malriĉuloj, Sankta Luko intencas proponi ne tiom personan portreton kiom tipan pri la homo kiu retrovas sin mem. Malgraŭ la anatemo flanke de la religia institucio por tiuj kiuj vivis ekster la Leĝo kaj la malŝato per kiu oni traktis ilin, Zakĥeo fariĝas modelo de tiuj kiuj sin sentas tuŝitaj de la savo, kiel senpaga donaco. Fakte ne estos la ĉefimpostito kiu vidas Jesuon, kvankam tiu estas lia plej grava deziro kaj li klopodas kiel plej eble por tion atingi (*peni vidi Jesuon/ antaŭkuri antaŭen/ supreniri sur sikomorarbon*) sed estos la Sinjoro kiu ekrimarkos Zakĥeon sur la arbo kaj kiu invitos lin malsupreniri el ĝi kaj anoncos al li ke Li intencas loĝi ĉe li, tiel ke tiom da peno kiel tia kiu elmontris la pekulon estu ŝparata ekde tiu momento al tiuj samaj kiel li estas.

Verŝajne estas la facileco per kiu la Sinjoro difinas la renkontiĝon kun tiu kiu estis perdita kiu determinas la negativan reagon de la konformistoj. Kaj la murmurado de ĉiuj homoj, vidinte Jesuon kiel gaston de malpurulo, ne atendigas sin. La evangeliisto ne bezonas doni pliajn klarigojn, la murmurado ne falas sur la personon de la impostisto, kiu, praktikite estas ignorata de la ĉeestantoj (temas nur pri “pekulo”), sed ĝi falas sur la personon de Jesuo, kies konduto estas neeltenebla. Kaj jam la trian fojon (tiu definitiva) oni per murmurado riproĉas al Jesuo lian konduton tute ne respektan je la Leĝo fronte al eksterleĝuloj (vd. Lk.5,30; 15,2).

En la domo de la pekulo oni nomas Jesuon “Sinjoro”; Zakĥeo rekonas lin tia kaj li esprimas la efikojn de tiu ĉi ĉeesto: la ĝojon kaj la kundividon. Tiuj ĉi estas la du aspektoj kiuj nun karakterizas la vivon de la kredanto kaj kiuj klarigas el kio konsistas la savo, tiu senpaga amo kiu redonas la vivon kaj la dignon al la homo. Tiu kiun oni konsideris malpura, tiu ĉi ĝuste elmontras sian vivan ĝojon pro la renkontiĝo kun la Sinjoro, dum tiuj kiuj sin taksis puraj restas en la malagrablo esprimita pere de la murmurado.

Antaŭ la Sinjoro komforte sidanta en lia hejmo, Zakĥeo tamen ne faros deklaron pri fido, sed pri sia enspezaro sin engaĝinte doni al malriĉuloj la duonon de sia riĉaĵo kaj la kvaroblon al tiuj kiujn li trompe priŝtelis. Tiamaniere Zakĥeo estas restarigita en la posteularo de Abrahamo, li refariĝas eĉ partoprenanto en la promesoj kaj en la benoj direktitaj al la popolo de la interligo, kaj tiamaniere li akceptas la modelon de homeco proponatan de la “Filo de la homo”. Fakte, ne sufiĉas esti filo de Abrahamo, sed oni devas sin identigi en tiu homeco kiun Jesuo elmontris per sia persono kaj per sia vorto. Tia estos la efiko de la savo ekprovita de Zakĥeo, tiu ĝojo pro la akcepto kaj pro la kundivido kiuj kondukos lin atingi sian veran homan grandecon.

“La Filo de la homo venis serĉi tion kio estis perdita”, estas tiu ĉi fina deklaro la legadŝlosilo de la tuta evangelipeco: Jesuo, la plene realigita homo, venas serĉi ĉiun homon por ke li povu atingi tian celpunkton.

Ricardo Perez Marques